



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 7-a de Februaro 2022

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Avigail Meŝulam, Inbar Mor, Amri Wandel (fizike); Mikaelo Lineckij, Ŝaj Mor, Ŝlomo Ŝaĥar, Eran Yuval-Vodevoz, Gabi Zeevi (zome).  
Gasto: Judith Epstein.

*Protokolo de la pasinta (januara) kunsido estis sendita al la estraranoj kaj enretigita.*

### 1. Raportoj

- a) **Jehoŝua**: la senditaj malnetoj de la protokoloj aspektas fuŝe printitaj. Konkludo: ni devas uzi kongruajn formojn de la teksto-prilaborilo.
- b) **Amri**: En la marta n-ro de la revuo *E-o* aperos mia artikolo pri la memortago de Holokaŭsto, kaj aliaj raportoj pri ELI en la UEA-forumoj. Prof. Humphrey Tonkin proponas, ke estu en la retejo de ELI konstanta speciala memoraĝo pri la Holokaŭsto.

### 2. La 22-a Israela Kongreso (Amri)

Amri subskribis la oficialan kontrakton kun *Ruth Daniel* anstataŭ Nava (kiu estas okupita pro familiaj zorgoj). La kosto por unu homo en dulita ĉambro por du noktoj estos 450 NIS. Eblos nuligi 45 tagojn antaŭe senkoste. Jehoŝua: ni instigu nian membraron pagi iun garantion. Amri: ni devas informi ankaŭ la eksterlandanojn. **Decido**: Amri finverkos la programon kaj skribos al la eksterlandaj aliĝintoj en 2020; krome kontaktos la hotelon pri malklaraj punktoj en la kontrakto. Post la finaranĝo kun la hotelo ni devos kuraĝigi la membraron partopreni.

### 3. Libro-magazeno por ELI (Ŝlomo)

Ĉe Amri estas 2 skatoloj da libroj, ĉe Eran – 1, ĉe Doron Modan – ĉ. 30; ĉe Jinon Meiri (en Kirjat-Tivon) multaj skatoloj kaj bretoj da libroj. Ŝlomo daŭrigos siajn serĉojn (kun 100-mil-sikla buĝeto).

### 4. Oficejo (Amri)

- a) Laŭ s-ro Vardi la perspektivoj por luigo de oficejoj en nia etaĝo en Alon ne estas bonaj. 4 oficejetoj estas nun liberaj, 5 aliaj baldaŭ liberiĝos. Li ankaŭ diris, ke nia oficejo havas malavantaĝojn: travidebla muro kun la apuda oficejo (tion eblas korekti) kaj la necesejo vidalvide al ĝi. Eble ni mem devus serĉi luanton por pli malalta prezo – 1,500 NIS (anstataŭ 2,000)?
- b) Iu firmao volas aĉeti la tutan etaĝon. Laŭ la ofertita prezo ni povus vendi nian oficejon por preskaŭ duobla prezo ol la aĉeto. **Eran**: ni ne vendu, sed luigu al ili nian areon.

### 5. Etikedoj por la IE (Mikaelo)

Jehoŝua ankoraŭ ne sendis ilin al Mikaelo.

**La venonta kunsido**: lunde, la 7-an de Marto 2022, je 20h00 (Alon-turo, hibride)

*Protokolis: Gabi Zeevi*